numero 98

oktobro 2009

INTERNACIA KOMERCA KAJ EKONOMIA FAKGRUPO

# La Merkato

ISSN 0941-9306

## Gravaj ŝanĝoj ĉe IKEF

Sur la sekvantaj paĝoj vi povos legi ke IKEF dum kelkaj jaroj havos tre limigitan aktivecon; ni esperas relanĉi la asocion okaze de la UK en Kopenhago en 2011. Intertempe *La Merkato* nur aperos unufoje jare, verŝajne ne estos estrarelektoj kaj ne plu estos postulataj membrokotizoj (kvankam libervolaj kontribuoj kompreneble restos bonvenaj).

Pro tio la reta membro-administrado je [www.ikef.org](http://www.ikef.org) iĝos ankoraŭ pli grava. Membroj kiuj forgesis sian pasvorton, povas peti ĝin je ikef(a)telenet.be.

## Enhavo

IKEF dormetos dum kelkaj jaroj . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 3
Raporto pri la IKEF-kunveno dum la UK . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 4-5
Nova eŭropa retpaĝaro por komercistoj . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 5
Internaciaj organizoj en Belgio . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 5
Novaj membroj - IKEF-perantoj intervjuataj de ĉina radio . . . . . 6
Jarkolekto de TAKE aperis - Nova AVI-regularo en EU ekde 2010 7
Okazis 13a Investa kaj Komerca Forumo en Ĉinio . . . . . . . . . . . . . 7



**La Merkato** (LM) (ĝis numero 26: *Laŭokaza Novaĵletero*) estas revuo de IKEF. Ĝi aperas duronjare [kvaronjare ĝis 2005] ([jan]-apr-[jul]-okt) kaj servas al la membraro kiel komunikilo. Redaktoro: Roland ROTSAERT. Limdato: mezo de la monato antaŭ apermonato.

**Estraro de IKEF**: Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario: vakas; S-ro Roland ROTSAERT, Financa Konsilanto; D-ro Achim HORNECKER; S-ro Silvio KNIESS MATES; D-ro Rainer KURZ; Prof. OOBA Atsua; S-ro WANG Tianyi.

**Revizoro por la financa raporto**: D-ro Gianfranco POLERANI.

**Financa sidejo kaj membrara administrado**: Ĉe s-ro Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, BE-8000 Brugge, Belgio, tel/fakso/respondilo: +32-50-330004; retpoŝto: roland.rotsaert(a)telenet.be.

La jara **membrokotizo** ekde 2008 estas 10 eŭroj (EUR) por landoj laŭ UEA-kategorio 'A' ('riĉaj landoj') kaj 5 EUR por landoj laŭ UEA-kategorio 'B' ('malriĉaj landoj') (aŭ egalvaloro en konverteblaj valutoj). Kotizo estas por la kalendara jaro. Membro kiu aliĝas dum la jaro pagu proporcie pli ĝis la fino de la posta jaro. Dumviva membreco akireblas per unufoja pago egalvalora al 20-obla membrokotizo. *Provizore (2009-2011) ne estas postulata membrokotizo.*

**Kontoj**:
- ĉe UEA kaj FEL: kodo *ikef-c*
- [www.moneybookers.com](http://www.moneybookers.com) (konto=retadreso de la kasisto)
- per banko: petu kontoinformon de la kasisto

**Perantoj**

*Internacie*: Flandra Esperanto-Ligo (fakso +32-3-233.54.33, retpoŝto financoj(a)fel.esperanto.be)

*Brazilo:* Silvio KNIESS MATES (silvio(a)davincibrasil.com.br; Banco do Brasil SA, Branĉo 3174-7, konto 6999-x, RS 40,00)

*Ĉinio*: S-ro WANG Tianyi, Xi'an Jiangong-lu 3, CN-710043 Xi'an, telefono + fakso 0086-29-2232952, retpoŝto komerco(a)public.xa.sn.cn

*Francio*: S-ro François-Xavier GILBERT, 33, rue Louvière, F-55190 Void-Vacon (CCP 1275-89 L Nancy), telefono kaj fakso +33(0)3.29.89.82.15, retpoŝto efikso(a)wanadoo.fr

*Hungario*: D-ro GETHER I., Berenyi u. 8, H-1016 BUDAPEST, paloc1(a)inbox.com

*Italio:* D-ro Gianfranco POLERANI, Viale G. Suzzani 2, I-20162 Milano, retpoŝto g.polerani(a)tiscalinet.it (poŝta konto 37485208)

*Japanio*: S-ro YAMASAKI Seikô, J-185-0014 Tôkyô, Kokubunzi, Higasi Koigakubo 3-18-12, retpoŝto syama(a)qf6.so-net.ne.jp (pĝk. n-ro 00160-3-253232, kotizo 2000 enoj)

*Kroatio*: S-ro Vjekoslav MORANKIĆ, Lipa 40 E, HR-51000 RIJEKA, retpoŝto esperanto.rijeka(a)ri.htnet.hr.

**IKEF-informoj en Interreto**: [www.ikef.org](http://www.ikef.org)

**IKEF dormetos dum kelkaj jaroj**

En 1985, kiam IKEF, la Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo, estis fondita, la ĉefaj Esperanto-aktivuloj rilate al komerco kaj ekonomio loĝis en okcidenta Eŭropo kaj Japanio. Tio evidentiĝas el la nomoj de la fondintoj kaj estraranoj.

En la pasinta kvarona jarcento okazis gravaj ŝanĝoj, ankaŭ en la Esperanto-movado. Nun la esperantistaj komercistoj - kaj aktivaj IKEF-membroj - precipe troviĝas en Ĉinio kaj kelkaj aliaj aziaj landoj, en meza Afriko kaj en Brazilo. Bedaŭrinde ili ankoraŭ ne havas sufiĉe da fortoj por kontribui al la asocio.

La efikoj videblis dum la pasintaj jaroj: la membronombro stagnis, ne estis trovita prezidanto, ne estis lanĉitaj novaj projektoj, la revuo nur aperis dufoje jare...

Post diskuto en la neformala IKEF-kunveno dum la Universala Kongreso, kaj post ideo-interŝanĝo inter la estraranoj kaj kelkaj pliaj membroj, estis decido ke IKEF dum kelkaj jaroj dormetos kaj nur havos minimuman agadon:

- Aperos (post la numero de oktobro 2009) nur unu numero de La Merkato jare, nome en aprilo. Ĝi enhavos la agad- kaj financan raportojn, inviton al neformala dumkongresa kunveno, kaj - se tiaj tekstoj alvenas - artikolojn utilajn por la membraro.
- Ne estos petata kotizpago; membro kiu pagis kotizon por la jaro 2007 aŭ poste restas membro; novaj membroj aliĝos senpage.
- IKEF restos aliĝinta membro de UEA kaj pagos la bezonatan kotizon.
- La retpaĝo www.ikef.org (kun la reta adresaro) daŭre funkcios, sed kun limigitaj enhavo kaj ĝisdatigoj.
- Ne okazos estrarelektoj, krom se valoraj kandidatoj anoncas sin.
- La listo http://groups.google.com/group/komerco estos la ĉefa komunikilo.

Tiu situacio daŭros du jarojn, ĝis la universala kongreso de Kopenhago en 2011. Tiam espereble estos novaj kandidatoj por la estraraj funkcoj kaj eblos relanĉi la asocion.

Roland ROTSAERT



**Raporto pri la IKEF-kunveno dum la 94a Universala Kongreso**

Okazis mistera fakkunveno de IKEF la 30an de julio 2009 dum la UK en Bjalistoko. Ĉar en la lasta IKEF-bulteno estis menciita, ke ne okazos estrarkunveno dum la UK, neniu atendis iun IKEF-kunvenon, do neniu estis surprizita ne trovi ĝin en la kongreslibro. Surprizigo ja ekestis post invito en la Kongresa Kuriero. Ĉeestis unu estrarano, prof. Ooba Atsuo kaj malpli ol 10 membroj kiuj interdemandis «ĉu vi organizis ĉi tiun kunvenon?» Ĉar ĉiuj diris ne, la kunveno nomiĝis «mistera». Ekster la membroj partoprenis deko da nemembroj. Kompreneble ankaŭ ne estis programo. Kees Ruig petis al prof. Ooba, la sola estrarano, bonvenigi la ĉeestantojn. Flory Witdoeckt petis al Kees Ruig prelegeti. Poste Walter van den Kieboom (kiu envenis dum la prelego) aldonis diskuton pri la utilo de IKEF. Tiel okazis.

Post mallonga bonveniga saluto de Prof. Ooba, Kees Ruig prelegis pri «la utilo de Esperanto en la internacia komerco». Li konfesis, ke nuntempe ne estas reale kredi ke oni povu rekte negoci en Esperanto, i.a. ĉar UEA ĉiam neglektis la industrion kaj komercon (ankaŭ en estrarfunkcioj). Relative malmultaj esperantistoj estas troveblaj en industrio kaj komerco. Eĉ grava parto de la IKEF-membraro ne estas aktivaj industriistoj aŭ ekonomikistoj. La kelkaj esceptoj nur konfirmas la konstaton. Tiel longe kiel Esperanto estas privata iniciativo, ĝi neniam venkos la mondon. Nur kiam aŭtoritatoj/registaroj transprenos tiun respondecon, la internacia lingvo monde enkondukiĝos. Nia tasko estas vivteni Esperanton ĝis tiam. (Esper)eble Ĉinio, rapide kreskanta mondpotenco kiu baldaŭ (eĉ jam) ne plu povas esti neglektata, iam povos efektivigi tion. Se Ĉinio dirus : «Estas pli da homoj kiuj parolas la ĉinan ol la anglan, kial ni lernus la anglan? Do, Mondo, ni donas al vi la elekton: aŭ vi lernu la ĉinan aŭ Esperanton!» Verŝajne tiam la mondo preferus la facilan internacian lingvon super la komplikan ĉinan. Do bela tasko por niaj ĉinaj samideanoj.

Tamen jam nun Esperanto estas, kvankam malrekte, tre utila en la internacia komerco. Kiel ekzemplo Kees Ruig priskribis siajn ofertojn en Japanio, lando kiun li vizitis dufoje jare dum po unu monato dum periodo de dek jaroj (1973-1982) reprezentante la plej grandan maŝinfabrikon de Nederlando (Stork). Per Rondo Hobio en Tokio kaj per Oomoto li faris multajn amikojn kaj tiel lernis multegon pri la kulturo, socio kaj ekonomio de tiu lando. Tiujn sciojn li povis uzi (montri) dum liaj negocoj kaj pro tio povis tre rapide gajni la fidon de la japanaj negocpartneroj. Tio multege helpis en la sukceso de la negocoj. Eĉ la direktoraro de Stork rekonis la valoron de Esperanto. Do Esperanto povas multe kontribui al sukcesplena komercado.

Poste s-ro van den Kieboom publike demandis: "Kiel plu kun IKEF?» Priparoliĝis la situacio de la antaŭa prezidanto, la manko de kandidat-estraranoj kaj la fakto ke ni ne rajtas esperi ke la fidelega kasisto "poreterne" tiros la IKEF-koĉon. Ĉiuj kunvenantoj rekonis la problemojn sed tamen ne volis perdi IKEF. Kees Ruig sugestis ne likvidi IKEF sed endormigi ĝin ĝis la tempo estos pli favora. La ĉeestantaro favoris la ideon. Detaloj ne estis priparolataj. Kees Ruig proponis ke s-ro Rotsaert eldonu lastan bultenon en kiu li petas la opinion de la membroj pri tiu propono kaj ke li mem difinu la detalojn de tiu vintra dormo. En tia artikolo estu menciata, ke tiuj kiuj ne volas endormigi IKEF estu pretaj mem ludi aktivan rolon en la fakgrupo.

Fine petis la parolon Brazilano, kiu volis vendi sian produkton. Li faris mallonge. Li ne estas IKEF-membro kaj ĉiujare aperas kun alia produkto, prezentante ĝin en neprofesia maniero.

Post iom pli ol unuhora kunveno Flory Witdoeckt fermis la kunvenon.

(laŭ raporto de Kees Ruig)

**Nova eŭropa retpaĝaro por komercistoj**

Antaŭ nelonge la Eŭropa Komisiono tute rearanĝis kaj plibonigis la interretan portalon http://ec.europa.eu/youreurope/business, kiu en multaj lingvoj konsilas entreprenistojn pri starto de komerco, investo en alia lando, necesaj formalaĵoj, ktp.

**Internaciaj organizaĵoj en Belgio**

FAIB (la federacio de asocioj internaciaj en Belgio, www.faib.org) denove faris enketon por taksi la gravecon de tiuj organizaĵoj por la belga ekonomio.

La belga ĉefurbo Bruselo restas la preferata ejo por lokigi internacian asocion: en la jaro 2007 tie estis 1677; en Parizo estis 819 kaj en Londono 701. Precipe la nombro de grandaj asocioj (kun jara buĝeto de pli ol 625.000 eŭroj) rapide kreskis.

84 % de la buĝetoj venis el eksterlando, dum 83 % estis elspezitaj en Belgio. La asocioj dungis 12.000 personojn (plen- aŭ parttempe).

La kompleta raporto (en nederlanda, franca kaj angla lingvoj) legeblas je http://faib.org/survey_2008.



**Novaj membroj**

389. Kossi WOUDJI, p.a. Dénis BIAYE, Seventh Day Adventist Church, B.P. 1013, Dakar, Senegalo, swoudji55(a)yahoo.fr

390. Faye Assane, Colobane 1, 434 Rufisque, Senegalo, °1960, komercisto, damanemanu2000(a)yahoo.fr, http://fayeazou.skyrock.com

391. Faye Babacar, Colobane 1, 434 Rufisque, Senegalo, °1957, elektrikisto, babacarfaye25(a)yahoo.fr

392. WANG Qingsu (s-ino), Bei Xiaoqu Dongyuan 6-140, Hunan Keji Daxue, CN-411201 Xiangtan, Hunan, kagenka2005(a)hotmail.com

393. LONG Zhang, 5-5-3, Kanĝin Yuan, 36 Shŭing Xijie, Yipin Tianxia Dajie, 610036 Chengdu, Ĉinio, °1973, softvara inĝeniero, biologo, komercisto, zlong(a)nialingvo.com

394. Michel CERISAY, 1 Place des Vents Provencaŭ, FR-13140 Miramas, Francio, °1949, mekanikisto kaj fajrobrigadisto,mcerisay(a)gmail.com

395. Ionel BODALE, Calea Obcinilor Nr. 3 Bibis Ap. 22, 720262 Rumanio, °1961, inĝeniero, bodliv(a)yahoo.com

396. Bengt NORDLÖF, Boforsgatan 23, SE-123-46 FARSTA (STOKHOLMO), Svedio, °1937, ĵurnalisto kaj abelbredisto, bengt(a)esperanto.se

**Brazila kaj ĉina IKEF-perantoj intervjuitaj de Ĉina Radio**

Okaze de finiĝo de ilia 50-taga komercvojaĝo tra 40 urboj (ĉ. 80 fabrikoj) en ĉemara regiono de Ĉinio, nia ĉina peranto Ĉielismo (Wang Tianyi) kaj lia brazila komercpartnero Silvio Kniess Mates vizitis Esperanto-studion de Ĉina Radio Internacia. Ili ambaŭ estis intervjuitaj de parolistino Shanshan, kiun interesiĝas pri nia aktivado en komerco per Esperanto.
Rigardu je http://esperanto.cri.cn/641/2009/09/23/1s102818.htm aŭ rekte mms://media.chinabroadcast.cn/esperanto/wangtianyi_kaj_silvio.mp3.




**Jarkolekto de TAKE 2009 aperis**

Ĵus aperis la 'Jarkolekto de TAKE 2009', la jara faka libro de la Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj.

En ĝi estas fakaj artikoj pri tegmentoj, frontado kontraŭ humigo, ŝtalo-konstruktoj, ĉinaj ĉielskrapaj domegoj k.a. Aŭtomate ricevas ĝin la membroj de TAKE (jara kotizo: 6 eŭroj).

Informoj: take-esp8(a)free.fr. Detalaj informoj pri TAKE aperas je la lasta paĝo de la papera eldono de ĉi tiu revuo.

**Okazis 13a Investa kaj Komerca Forumo de Ĉinaj Oriento kaj Okcidento**

Dum la 5a - 8a de aprilo 2009 okazis 13a Investa kaj Komerca Forumo de Ĉinaj Oriento kaj Okcidento (The Investment & Trade Forum for Cooperation between East&West China http://www.onlinew.gov.cn/onlinewEN/column/index/index.xml en Siano, Ĉinio.

Unuafoje, korea delegacio kun 4 E-komercistoj ĝin partoprenis invitite de CCPIT-Shaanxi, kaj ankaŭ ĉinaj E-komercistoj venis de diversaj regionoj. Ventontajare je la sama dato okazos la 14a Forumo. Ni esperas ke pli multaj E-komercistoj partoprenos ĝin en nia urbo Siano(Xi'an).

Ĉielismo WANG Tianyi

**Nova AVI-regularo en Eŭropa Unio ekde 2010**

Ekde 2010 en la Eŭropa Unio validos nova AVI-regularo por transnaciaj transakcioj. Ni planas por la venonta numero de La Merkato superrigardon de la ĉefaj eroj.

*Sur p. 8 de la papera versio estas informilo pri TAKE*